


# HUNGARA FERVOJISTA MONDO



Esperanto, Internacia lingvo



**Grandrapida Shinkanzen trajno en Japanio**

3  
----- 59-a jarkolekto  
2015



## HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Revuo de la Fervoĵista Esperanto-Movado  
en Hungario

Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.

.....  
Respondeca redaktoro:

István Gulyás

Eldonas:

Hungara Fervoĵista Esperanto-Asocio

Hungara Sekcio

de Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio

Poŝta adreso: HU-1155 Budapeŝt

Rákos út 98. I/9.

Aperas kvaronjare

Abonprezo: al hungara adreso: HUF 2000

al eksterlanda adreso: EUR 12

\*

## MAGYAR VASUTAS VILÁG

A magyar eszperantista vasutasok

központi lapja

Felelős szerkesztő: Gulyás István

Kiadásért felelős

A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület

„Szkenguru” Nyomda Budapest

Felelős vezető: Balla László

.....  
ISSN 0230-323x  
.....

## ENHAVTABELO:

- 42: I. Gulyás:** Solvi la problemojn  
**43: J. Halász:** La centa UK, kiel ni travivis ĝin  
**54: I. Gulyás:** La 47-a Landa Amika Fervoĵista Esperanto-Renkontiĝo  
**55: J. Halász:** Laboras la renoviga vagonaro de fervoja subkonstruaĵo sur la ĉef-linio inter Budapeŝt kaj Miskolc  
**59: HFEA:** Nekrologo (D-ro Ferenc Phersy)

## SOLVI LA PROBLEMOJN!

Alproksimiĝas la jarfino. Jam nun ni devas priatenti la planitajn kaj plenumitajn taskojn. Nia asocio agadas laŭ la aprobita laborplano, kaj tiu gvidfadenado helpas al ni laŭplane kaj sisteme labori. En ĉi tiu jaro multaj malfacilaĵoj malhelpas nian laboron, sed malgraŭ tiuj problemoj kelkaj entuziasmaj fervoĵistaj esperantistoj efike agadas. En la kuranta jaro ni havos ankoraŭ kelkajn gravajn taskojn. Mi jam decidis, kaj oficiale anoncis mian demision pri mia prezidanta posteno kaj pri la ĉefredaktora funkcio de nia faka revuo Hungara Fervoĵista Mondo pro mia alta aĝo kaj malsano. La ĝenerala kunsido de nia asocio establis komisionon por serĉi novajn kandidatojn por tiuj postenoj. Ĝis nun la fortostreĉo por trovi taŭgajn hungarajn fervoĵistajn esperantistojn estis vana kaj ne sukcesis solvi tiujn gravajn taskojn. Kio okazos en la sekva ĝenerala kunsido? Kia maniere agados la estraro sen prezidanto? Ĉu neniu volas redakti nian fakan revuon, kiu seninterrompe aperas ekde 1957?

Alia grava problemo atendas nin ĝis la jarfino. Oni anoncis, ke nia asocio devas denove forlasi nian rezidejon en la strato „Városligeti Fásor”, kaj devas translokiĝi al la fervoĵista kulturdomo de Istvántelek. Kiu helpas al mi por paki, peni pri parto de niaj biblioteko, paperaĵoj kaj multaj aliaj dokumentoj kaj materialoj? Mi ne volas plendi, sed laŭ mia sperto mi ne vidas la trankviligajn solvojn. Sed mi esperas, ke niaj membroj el la provincaj laborgrupoj kaj membroasocioj helpas solvi tiujn gravajn taskojn.

**István Gulyás**

prezidanto de HFEA

**59-a jaro N-ro 3. JULIO-SEPTEMBRO**

## LA CENTA UK, KIEL NI TRAVIVIS ĜIN

Dum la lastaj jaroj ofte ni travivis la centan datrevenon de iu grava evento de la Esperanto-movado. Ĉi-jare denove ni havis festan momenton – ĉar laŭ mezurilo de la historio temas pri momento – centafoje oni aranĝis la mondan kongreson de la Esperanto-movado. La loko de tiu grava evento estis la norda franca urbo Lillo (*Lille*). La gvidantoj de UEA kalkulis pri granda nombro de la partoprenantoj, kaj pro tio elektis la grandan urbon por loko de la jubilea kongreso, ĉar ĝi estas sufiĉe proksime al Bulonjo ĉe Maro – loko de la unua kongreso - kaj kapablas doni pli bonajn cirkonstancojn (kongresejo, tranoktado, trafiko ktp.) por la granda evento. La politika volo de *Pierre Mouroy* estis fari el Lillo grandan Eŭropan metropolon. *Pierre Mouroy* (1928 – 2013) estis franca politikisto de la Socialisma Partio. En 1981, kiam *Francois Mitterand* gajnis la elektojn kaj iĝis Prezidento de Francio, *Pierre Mouroy* estis nomumita ĉefministro de Francio, kiun postenon li plenumis inter 1981 – 1984. Inter 1973 – 2001 li estis urbestro de Lillo.

El urbo *Miskolc* duope kongreso, mi kaj mia elekti el kelkaj eblecoj kongreson, fine ni aliĝas al tiu grupo, Segeda Esperanto gvidado de *JoZefir Jó* edzino *Idikó* (*JoZefiro Jó* vere *Baksa*, sed li opinias,



La ĉefenirejo de la Granda Palaco en Lillo

ni aliĝis al la nepo. Ni povis por patopreni la decidis tiel, ni kiun organizis la Grupo, sub *Baksa* kaj lia *Ferenczi*. estas Jozefo tiom da Jozefo

troviĝas en nia landa movado ke li volas iel maniere diferenci sin de la aliaj, pro tio li uzas sian nomon en tiu skibita formo). Ili organizis Internacian Karavanon al UK 2015. Lillo, kun franca rondvojaĝo post la kongreso.

Kiam la 24-an de julio en Budapeŝto, ĉe la Orienta Stacidomo kune kun kelkaj budapeŝtanoj ni enaŭtobusiĝis, en la veturilo jam sidis ok personoj el urbo *Szeged* – inter ili membroj de la muzika trio „La teAmo FLOrante” - pli ol dek koreanoj, kaj du japanoj. Do la pasaĝeraro de la aŭtobuso dum nia vojaĝo de la unua minuto ĝis la lasta vere estis internacia, kiu dum la vojaĝtempo ankoraŭ plu koloriĝis. Fine aliĝis al nia vojaĝgrupo kvin personoj en urbo *Tata*. Vespere ni alvenis en urbon *Nürnberg*, kie ni tranoktadis.

La sekvan tagon, kiam ni ekveturis el *Nürnberg* ankoraŭ daŭris la ardevarma somervetero, sed post mallonga tempo ni atingis pluvregionon, kaj ĉe la unua ripozloko ni devis elpreni el niaj pakaĵoj niajn ombrelojn kaj pulovrojn. Posttagmeze ni alvenis al la kongresejo en urbo Lillo, kiu troviĝis en la Granda Palaco (*Grand Palais*). La Granda Palaco troviĝas en Lillo apud la urbocentro kaj la stacidomoj. Ĝi estis inaŭgurita en 1994, kaj konsistas el tri ĉefaj partoj: kongresejo, ekspoziciejo kaj spektaklejo. La projektisto de la konstruaĵo estas *Remment Lucas Koolhaas*, nederlanda arkitekto.

Teretaĝe en la enirhalo estis la informejo kie ni ricevis niajn dokumentojn, kaj insignon de la kongreso. Ni aliĝis al tiu amaso de la kongresanoj, kiuj alveninte partoprenis en la Interkona Vespere kaj Movada Foiro. Kun ĝojo ni salutis niajn malnovajn eksterlandajn amikojn, kaj ankaŭ tiujn niajn samlandanojn, kiuj alimaniere (per aviadilo, publika aŭtobuso ktp.) alvenis al la kongreso. En la halo *Michaux* estis vigla kavalkado. Ni kolektis multe da invitiloj por estontaj Esperanto-aranĝaĵoj,



*Vigla kavalkado de la kongresanoj en la Movada Foiro*

kaj informilojn de diversaj Esperanto-kolektivoj.

Malfrua vespere ni alvenis al nia tranoktadejo. La hotelo, en kiu ni loĝis dum la tuta tempo de la kongreso, estis ekster la urbo, kiun ni atingis post dekkvin minutoj da veturado per nia

aŭtobuso. Ĝi estis modesta, ne multekosta, tamen ekipita per la plej bezonataj servoj. Pro la granda distanco inter la hotelo kaj la kongresejo, ĉiu tage matene ni veturis al la kongresejo ĝis la komenco de la unua kongresa programo, kaj vespere ni ekveturis al nia hotelo post la fino de la lasta programo. Dum la tuta vojaĝo ni loĝis en trilitaj ĉambroj, kaj nia tria samĉambrulo estis tre simpatia koreano Kang Hongu, vicprezidanto de KEA, kies karesnomo estis „Kanguruo”.

La 26-an de julio je la 10-a horo komenciĝis la Solena Inaŭguro de la 100-a jubilea Universala Kongreso. Pro la granda nombro de la kongresanoj ne ĉiuj povis ricevi lokon en la Salono *Zamenhof*. (Ni apartenis al tiuj feliĉuloj, kiuj povis sidi tie). Laŭ nia sperto kies kong-resnumero estis pli granda ol iu decidita numero tiuj ricevis lokon en la Salonoj *Hodler* kaj *Lapenna*, kaj ili spektis la solenaĵon pere de projekciado.



*Kun amiko Jean Ripoĉe dum la Solena Inaŭguro*

Antaŭ la komenco de la inaŭguro atingis nin agrabla surprizo, ĉar sidiĝis apud nin nia malnova amika geedza paro, s-ro *Jean Ripoche* kun lia edzino *Raymonde*. Ni tre ĝojis pro nia renkontiĝo, kaj ĝis komenco de la solenaĵo ni konversaciis. Dum kolektiĝo de la kongresanoj, la laŭtparolilo informis nin pri alveno en la salonon de *L.C. Zaleski-Zamenhof* kaj antaŭaj prezidantoj de UEA. La alvenon de la menciitaj personoj la ĉeestantoj akceptis per granda ovacio kaj aplaŭdo.

Ĉeestis ankaŭ la Alta Protektanto s-ro *Frédéric Cuvillier* eksministro kaj urbestro de Bulonjo ĉe Maro, kiu en sia parolado invitis la ĉeestantojn viziti la lulilon de la



*Prezidantaro de la Inaŭguro*

Universalaj Kongresoj dum la ekskursita tago. Li kaŭzis ĝojon per sia plano, starigi Esperanto-centron tie.

Salutis la kongresanojn *Xavier Dewidehem* prezidanto de LKK. Li prezentis tiun grandan laboron de la organizantoj kiun ili faris por plenumi la promesitan abundan programon.

Emociajn salutvortojn diris *L.C. Zaleski-Zamenhof*, kiu memorigis la

publikon, li unuafoje kiel 9-jarulo partoprenis la Universalan Kongreson en Stokholmo en 1934, kaj salutis la kongresanojn je la nomo de familio *Zamenhof*. Nun li sciigis al ni, fermi ĉi tiun „karieron”, ja li jam estas 90-jara. Ekde nun daŭrigos la tradicion – saluti la kongreson je la nomo de familio *Zamenhof* - liaj filinoj Hanna kaj Margareta. Ĉi-lastata post sia patro jam parolis en la inaŭguro, kaj laŭtlegis mesaĝon de sia fratino.

*Martin Schäffer* kaj *Stefano Keller* estraranoj de UEA legis la mesaĝojn de diverslandaj eminentulojn, inter aliaj tiun de la vicprezidanto de Eŭropa Parlamento mag. *Ulrike Lunacek*, kaj de federacia prezidento de Aŭstrio d-ro *Heinz Fischer*, kies gepatroj estis esperantistoj, kaj kiu mem estis Alta Protektanto de la Viena UK en 1992. *Stefan MacGill* vicprezidanto de UEA donis informon pri elekto de membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. La titolon ricevis la fama itala juristo *Giuliano Turone*. Poste *Barbara Pietrzak*, estrarano de UEA prezentis la novajn Honorajn Membrojn de UEA. Ili estas la franca verkisto-eldonisto *André Cherpillod*, kaj la germana historiisto, kaj eksestrarano de UEA *Ulrich Lins*.

Sekvis la festparolado de prezidanto de UEA, kiun sekvis la salutvortoj de reprezentantoj de TEJO, ILEI kaj SAT.

Sekve tion, okazis la landaj salutoj, kiujn gvidis estraranoj *José Antonio Vergara* kaj *Lee Jungkee*.

Estis impona la rekorda nombro, pli ol 70 landoj kiu montris Esperanto prenis gigantajn dimensiojn en la mondo ekde la komenco en Bulonjo ĉe Maro.

Post la komuna kantado de la Himno la prezidanto *Mark Fettes* deklaris la kongreson malfermita. Unuafoje en historio de UK, pere de interreto oni povis spekti la inaŭguron en la tuta mondo. Posttagmeze en la kongresejo komenciĝis la anoncita programo. Okazis podia diskuto pri la kongresa temo, kiu estis „Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj”. La intersiĝantoj aŭdis prelgon pri Francio.



*La malnova stacidomo en Lillo*

Ni ekiris malkovri la kongresan urbon. Proksime al la kongresejo ni trovis la malnovan stacidomon de Lillo (*Gare de Lille-Flandres*) kiu estis inaŭgurita en 1848. Ĝi estas linikomenca stacio kun granda ŝtalkingstruaĵa halo.



*La nova, moderna stacidomo en Lillo*

Post iom mallonga promenado ni alvenis al la nova stacidomo (*Gare de Lille-Europe*) kiu funkcias ekde 1994. Ĝi estas traira stacio de 333 km-ojn longa dutraka grandrapida fervojlinio, kiu estas parto de reto TGV. Ĉi tiu fervojlinio kunligas Parizon kun la landlimo al Belgio kaj tra la

Europa-tunelo (submanika tunelo) kun Anglio. La laŭhorara

veturrapido de la trajnoj, trafikantaj sur ĉi tiu linio estas 300 km/h. La traceado de la fervojlino ricevis multe da kritiko, ĉar ĝi evitas urbon *Amiens* sidejon de Pikardujo. La kabineto tiutempe elektis la pli mallongan vojon inter Parizo kaj Londono. En Lillo troviĝas tiu Regejo kaj Trafikreguligejo, kie fervojistoj administras kaj kontrolas la trajntrafikon de la grandrapidaj fervojlinioj Lillo-Parizo kaj Lillo-submanika tunelo.

Posttagmeze okazis la ekumena diservo en preĝejo de Sta Maŭricio, kiun ni partoprenis. La diservon gvidis pastroj *Gerrit Berveling* kaj fr. *Benoît Ente*.

La unua kultura evento de la kongreso estis dimanĉe vespere. Tio estis la Nacia Vespero. Kompanio „La Kompanoj” prezentis por la ĉeestantoj speciale kreitan spektaklon. Dum la tuta vespero gvidis nin Naturamiko, kiu estis giganto, deveninta el tradicio de la lokaj karnavaloj, kaj kiu bonvenigis la partoprenantojn de la 100-a UK en la akceptejo. Do, Naturamiko ĉi-vespere trairis el la akceptejo sur la scenejon. Kvankam Lillo situas en la norda parto de Francio, dum la programo tra popoldancaj tradiciaj muzikoj ni



*Ĉefa placo de Bruĝo*

vojaĝis tra la lando. La lastan parton de vespero kolorigis

bukedo de famaj francaj kanzonoj tradukitaj en Esperanton. Naturamiko kaj „La Kompanoj” celis 100 minutan kunĝuon por la 100-a UK. La grandsukcesa ĉefe muzika programo okazis antaŭ plena spektejo.

La 27-an de julio nia grupo per aŭtobuso vizitis la pitoreskan belgan urbon Bruĝon. (Bedaŭrinde nia vojaĝo koincidis kun la kongresa programo de IFEF, kiun pro tio ni ne povis partopreni). En nia aŭtobuso troviĝis kelkaj liberaj lokoj, kiujn okupis tiuj kongresanoj kiuj intencis veni kun ni en Bruĝon.

Bruĝo estas plej granda urbo de Okcidenta Flandrio, kun 117 mil da loĝantoj. Oni ofte nomas ĝin Venecio de Nordo, pro ĝiaj kanaloj. La urbo preskaŭ senvundite konservis sian mez-epokan staton. Post unuhora veturado ni alvenis en la urbon. Ni promenadis tra la urbo, kvankam de tempo al tempo pluvis, plue ventis. El la famaj kuriozaĵoj ni vizitis la ĉefan placon kun la fama sonorilturo, la



*La teAmo FLOrante*

Bazilikon de Sankta Sango (*Heilig Bloed Basiliek*), kie laŭ la legendo oni gardas boteton da sango de Jesuo Kristo, kaj la preĝejon de Nia Sinjorino (*Onze Lieve Vrouwekerk*), kie troviĝas la statuo de *Michelangelo*, titolita Madono kun sia filo. Revenante en Lillon, ankoraŭ ni atingis la finan parton de tiu kultura programo, kiu okazis en la centro de la urbo. Tiu kompanio – „La Kompanoj” - kiu estis unu el la ĉefrolantoj de la Nacia Vespero, invitis la interesiĝantojn, lokajn loĝantojn, kaj kongresanojn al sia programo „Surstrate kunkantu ni francajn kanzonojn en Esperanto kun La Kompanoj” Kiuj deziris aliĝi al la komuna kantado, tiuj ricevis la tekston de la kanzonoj.

Sekve tiun programon ni konatiĝis kun la centro de Lillo, kaj vespere ni partoprenis la kongresan balon. La 28-an de julio, antaŭtagmeze ni vizitis la libroservon kaj renkontiĝis kun malnovaj amikoj.



*La kongresanoj alvenas al la stacidomo de Bulonjo ĉe Maro*

Posttagmeze en la salono *Michaux* ni aŭdis riĉan muzikan programon. Ni ĝuis la koncerton Anjo Amika, kiu kantas en Esperanto ekde 1984. Per sia programo ŝi rikoltis grandan aplaŭdon. Sekvis ŝin alia hungara rolanto, la muzika trio „La teAmo FLOrante”, kies membroj venis el urbo *Szeged*, kaj apartenis al nia vojaĝgrupo. La talentaj knabinoj dum nia vojaĝo jam kelkfoje kantis por ni en la aŭtobuso, sed sur podio

unufoje ni vidis ilin ĉi-okaze. La membroj de la „teAmo FLOrante” estas *Anett Garamvölgyi* (kobzo, kantado), *Fruzsina Hódi* (drumo, kantado) kaj *Csenge Monori* (violono). Ili uzis la fonton de hungara kaj najbarlanda popolmuziko. La tekston de iliaj kantoj tradukis al Esperanto famaj poetoj. Ilia debuto en la kongreso estis tre sukcesa, kiun atestis la ricevita granda aplaŭdo, kaj multaj interesiĝantoj, kiuj post la programo venis al ili.

Vespere ni spektis teatran programon, kies titolo estis: *Feliĉas ĉiuj*. Ĝia temo estis

aktuala problemo de migrantoj. La spektaklo rakontis la migradon el la patrolando ĝis la alveno en Italio. En la teatraĵo la migrantoj parolis Esperante, kaj la praloĝantoj itale. (Ĉi-okaze la Esperanto-tradukaĵo de la itala teksto estis projekciita) La teatraĵo klopodis renversi la kutimajn perspektivojn. erkredo estis la ekskursita tago. LKK organizis tutagan ekskurson en urbon Bulonjo ĉe Maro. Pro la granda nombro de la partoprenantoj venis el Lillo ses aŭtobusoj. Post alveno en Bulonjo ĉe



*Statuto de Zamenhof antaŭ la stacidomo*

Maro, la partoprenantoj vizitis la teatron. Sur la teatra podio sidis inter aliaj la prezidanto de UEA, *Mark Fettes*, *L.C. Zaleski-Zamenhof*. *Brian Moon* laŭtlegis la tutan prelegon de Ludoviko *Zamenhof* el la 5-a de aŭgusto 1905. *L.C. Zaleski-Zamenhof* diris: „La vortoj de mia avo estas kortuŝaj por mi, precipe la parto pri francoj kaj angloj, rusoj kaj poloj. Mi ja estas franco kaj polo, sed super ĉio

mi estas homo kaj frato de aliaj homoj”. Post la solenaĵo la kelkcentoma publiko aranĝiĝis en paradan marŝon, portante Esperanto-flagojn kaj banderolojn. Ili marŝis al tiu stacidomo, kien en 1905 ankaŭ *Zamenhof* alvenis en la urbon. Laŭ la vojo policistoj regulis la trafikon, kaj la marŝon gvidis mem la urbestro de Bulonjo ĉe Maro.

Ĉi-tage ankaŭ nia vojaĝgrupo vizitis la lulilon de Universalaj Kongresoj, kaj per nia aŭtobuso ĝustatempe, antaŭ alveno de la parada marŝo ni atingis la stacidomon. Antaŭ la stacidomo sur la placo staras statuo de *Zamenhof*, sur kies piedestalon okaze de la 100-a UK oni metis memortabulon.

La alveninta amaso plenigis la placon, kie la animstato estis libera, gaja, solena, kaj kortuŝa. La amaso iĝis porokaza ĥoro kaj kantis la konatan kanton: „Esperanto estas la lingvo por ni, por ni ...” Sur la placo okazis ceremonio. La urbestro



*Nia vojaĝgrupo antaŭ la teatro de Bulonjo ĉe Maro*

salutis nin, parolois pri tio kion signifas Esperanto por sia urbo, kaj invitis la ĉeestantojn post la ceremonio en la urbodomon. Ni aŭdis alparolon je la nomo de esperantistoj, kaj oni malkovris la novan memortabulon por memorigi pri la nuna vizito, kaj metis florkronojn. La Esperanto-flagon, kiu kovris la memortabulon detiris la urbestro kune kun *L.C. Zaleski-Zamenhof*. la ceremonio finiĝis per la komuna kantado de Esperanto kaj la franca himnoj.

La amaso marŝadis al la urbodomo laŭ tiu vojo, kiun sekurigis la policistoj. Super la enirejo de la urbodomo flirtigis tri flagojn la venteto, tiun de Eŭropa Unio, Francio, kaj Esperanto. Ni pensas la granda salono de la urbodomo ne estis projektita por tiel granda amaso, kiel ni estis. Ĝi iĝis plenŝtopita de ni. Tamen eĉ la plej malgranda malakordo ne okazis tie. Post la saluto la urbestro proponis malplenigi niajn glasojn por Esperanto. La urbestra akcepto estis afabla, kaj daŭris preskaŭ du horojn. Poste nia grupo promenadis al tiu teatro kiu estis la unua kongresejo de la Esperanto-movado. (Rigardante la konstruaĵon, mi pensas sur tiu loko staris la iama teatro, kiun dum la forpasintaj jaroj oni modernigis). Super la enirejo ankaŭ ĉi tie flirtis Esperanto-flago.

Ni havis mallongan tempon konatiĝi kun la urbo, kiu iam estis fiŝista vilaĝo, sekve apudmara ripozloko, kaj nun estas urbo, kiu havas ankaŭ universitaton. Ni promenadis en la urbocentro, vizitis la havenon.

Nia aŭtobuso ekiris al direkto Amieno (*Amiens*). Dumvoje ni haltis ĉe ripozloko, kie ni havis eblecon viziti la marbordon. Ni ne kapablis meti niajn piedojn en la maron, ĉar la bordo estis abisma, kaj en la profundo ni vidis la akvon, kaj la restaĵojn de tiuj bunkroj kiuj estis konstruitaj dum la dua mondmilito.

Poste ni alvenis en Amienon, kiu nun konkuras kun nia kongresurbo. Amieno ekde mezepoko estas ĉefurbo de regiono Pikardio, kaj havas proksimume 134 mil da loĝantoj. Dum mezepoko la kultivado, kaj prilaborado de vajdo riĉigis la burĝaron. (Vajdo estas planto por havigi bluan koloron *isatis tinctoria* = tinktura izatido).

Tiu riĉeco ebligis la konstruadon de la katedralo. La Katedralo Nia Sinjorino de Amieno (*Cathédrale* estas romkatolika ka-Amieno. La katedralo fermis la ciklon de gotik-konstruado komenciĝis romanika katedralo havas formon de latina 1401 oni aldonis la turojn de la ĉefa fasado.



La katedralo en Amieno

La katedralo konservas, de Johano la Baptisto, kiuj mezepoko iĝu unu el la Eŭropo.

En la urbo vivis la fama *Verne*, ekde 1888 ĝis sia morto li estis membro de

*Notre Dame d'Amiens*) tedralo de la urbo estas gotika kaj ĝi klasikaj katedraloj. Ĝia en 1220, sur antaŭa detruita de incendio. Ĝi kruco kaj inter 1366 kaj kiuj situas ambaŭflanke

inter aliaj, du relikvojn igis ke la templo dum ĉefaj pilgrimlokoj de

franca verkisto *Jules* morto en 1905. Ĝis sia la urba konsilantaro.

Ni menciis, ke Amieno konkuras kontraŭ nia kongresa urbo Lillo. El la lokaj gazetoj ni eksciis, en Francio oni planas administraciajn reformojn. Laŭ la planoj oni volas unuigi du regionojn, nome Nordon (*Nord-Pas de Calais*) kaj Pikardion. Ni estis atestantoj de tiu konkuro, kiu disvolviĝis inter la du urboj. Temas pri tio, kiu el ili iĝu la ĉefurbo de la nova unuigita aministracia regiono?

Kiam ni alvenis en Amienon, la fama katedralo estis jam fermita. Ni faris mallongan promenadon en la urbo.

Ni planis rigardi la lumspektaklon ĉe la katedralo. Bedaŭrinde pli frue ni devis reveturi en Lillon ol kiam



*Kun la festanto Elizabeta Ködmön*

vesperiĝis, kaj tiam la progamo ankoraŭ ne komenciĝis. Malgraŭ tio ni alvenis al nia hotelo noktmeze.

La 30-a de julio estis streĉa tago. Inter la 13-a kaj 16-a horo estis la ĵuriado de aliĝintoj por la Internacia Arta Vespero. Ankaŭ niaj muzikistaj knabinoj, „teAmo FLOrante” prezentis sian konkurancan programon. La

prezentado havis riskaĵon. Ili

devis akiri en la konkuro iun lokon el la unuaj kvin, se ili volis iĝi partoprenantoj de la dua fazo okazanta vendrede. La plimulto de hungaraj kongresanoj ĉeestis kaj zelotis por ili. Per la prezentita programo la „teAmo FLOrante” havis grandan sukceson kaj akiris la trian lokon. Alia grava emocia evento de la tago estis, ke membro de nia vojaĝgrupo, Elizabeta Ködmön festis sian rondciferan naskiĝtagon. (temas pri virino, do ni ne malkaŝas kioman). Multaj personoj kolektiĝis ĉirkaŭ la longa tablo, ne nur hungaroj, kiuj venis gratuli kaj diri bondezirojn al la festanto. La ĉeestantoj kantis naskiĝtagon kanton, poste Anjo Amika kaj „teAmo FLOrante” salutis per kanto Elizabetan. La 31-an de julio ni ekskursis al Bruselo kaj *Waterloo*. La liberajn lokojn en nia aŭtobuso okupis polino, japanoj, kaj vojaĝis kun ni ankaŭ membroj de „teAmo FLOrante”, kiuj vespere deziris roli en la dua fazo de la kultura konkuro. Laŭ la vojaĝplano, nia grupo devis reveni en Lillon antaŭ komenco de ĉi tiu konkuro. En Bruselo ni fiksis la tempopunkton de ekiro al nia sekva vizitenda loko, t.e. Eŭropa Parlamento. La partoprenantoj en pli-malpli grandaj grupoj provis viziti la vidindaĵojn de la belga



*Granda Placo en Bruselo*

ĉefurbo. Unue ni vizitis la Grandan Placon, kiu estas ĉefa placo de Bruselo. Ĝi estas ĉirkaŭata de interalie la urbodomo kaj pluraj gildaj domoj. La placo estas

konsiderata de diversaj homoj, interalie de Victor Hugo, kiel la plej bela de la tuta mondo. La Granda Placo de Bruselo listiĝis en 1998 sur la listo de Monda Heredaĵo de Unesko.



*Antaŭ la Pisanta Knabeto en Bruselo*

Proksime al la Granda Placo troviĝas alia kuriozaĵo de Bruselo, la Pisanta Knabeto (*Manneken Pis*), ĝi estas statueto, 58 cm-ojn alta, kiun en festotagoj oni vestas per diversaj vestaĵoj. Laŭdire ĝi havas pli ol 700 vestaĵojn. Okaze de nia vizitado, ĝi portis nenian vestaĵon. La nun videbla statueto estas kopio de la unua, kiu

estis detruiita en 1817 de mense malsana krimulo.

Ni vizitis la promenstraton, vidis la konstruaĵon de la borso, tagmanĝis, kaj ekiris al nia aŭtobuso. Dumvoje kun ĝojo ni malkovris la statuon de la fama hungara komponisto, *Bartók Béla*, kaj eniris en la katedralon.

La katedralo Sankta Miĥaelo kaj Sankta Gudula (*Cathédrale St. Michel et Gudule*) estas la ĉefa preĝejo de urbo Bruselo kaj sidejo de la episkopujo Meĥleno-Bruselo. La katedralo estas konstruita laŭ gotika stilo. La 1200 vitraloj de la 16 ĥorfenestroj, parte eĉ originaj el la 16-a jarcento, ornamas la preĝejon kaj provizas ĝin per hela, lumtrafluata interno.



*La Reĝa palaco en Bruselo*

Revenante al nia aŭtobuso akceptis nin malagrabra novaĵo. La organizantoj de la Internacia Arta Vespero mesaĝis, „teAmo FLOrante” devas aperi en la kongesejo en Lillo je la 15-a por provi sur la scenejo, kaj instali la sonteĥnikon, en mala okazo ili ne povos roli en la Internacia Arta Vespero, kaj estos malkvalifikitaj el la konkuro. Tiam estis la 14-a kaj ni estis en Bruselo. Kion fari?

*JoZefiro* decidis tiel, la aŭtobuso transportas la muzikistojn en Lillon, la grupo restas en Bruselo, kien la aŭtobuso revenos, kaj la ekskursprogramo daŭros. Kelkaj japanoj reveturis kun la muzikistoj en Lillon, la plimulto de partoprenantoj restis en Bruselo. Ni provis konformiĝi al la nova situo, aŭdis placmuzikon en la parko.



*Eŭropa Parlemeŭtejo en Bruselo*

Poste ni vizitis la Reĝan Palacon, kiu estis konstruita en la 19-a jarcento, kiel oficiala rezidejo de la reĝa familio. Nia sekva celo estis la Eŭropa Parlamentejo, kien post iom da promenado ni alvenis. Ni havis eblecon eniri la vizitocentron de la Eŭropa Parlamentejo (*Parlamentarium*). Ĉi tie per interaktivaj materialoj ni povis ekkoni la historion de la Eŭropa integriĝo. El 24 oficialaj lingvoj de EU ni povis elekti la nian por rigardi la ekspozicion. Ni ricevis nacilingvan gvidfolion.

Post iom da atendo nia aŭtobuso alvenis, kaj ni ekveturis al Lillo. Ni faris devojiĝon al direkto *Waterloo*. Ĉi tie ni rigardis tiun memormonteton, kiun oni konstruis je honoro de tiuj belgaj kaj nederlandaj soldatoj kiuj mortfalis en la batalo, okazinta antaŭ 200 jaroj.



*Memormonteto en Waterloo*

Kiam ni alvenis en la kongresejon en Lillo, jam estis vespero, ni vidis la finan parton de la Internacia Arta Vespero. Bedaŭrinde la programon de „teAmo FLOrante” ni ne vidis. Ni eksciis nur la finrezulton, ili akiris la trian lokon.

Alvenis sabato, lasta tago de la jubilea UK. La Solena Fermo komenciĝis je la 10-a. La partoprenantoj rememoris pri la mortintoj.

Stefano *Keller* parolis pri agado de la gazetaro (ĵurnaloj, televido, radioj el Francio kaj Belgio). Ankaŭ ni povas atesti la gazetaro atentis pri la Universala Kongreso. En la kongresejo ĉiun matenon ni trovis la ekzemplerojn de la loka ĵurnalo, *La voix du Nord* (La voĉo de Nordo) kiu raportis pri la kongresaj eventoj. La televido dum la tuta kongresa semajno sciigis pri nia kongreso.

*Stefan McGill* vicprezidanto resumis la rezultojn de la Kapabligo. Marde estis tago de la Kapabligo, kiun organizis ILEI. Sukcesa estis ankaŭ la programo franca eksprese. Okazis KER ekzamenoj.

Pri la kulturaj aranĝaĵoj raportis estrarano *Lee Jungkee*. Li memorigis pri koncertoj, teatraĵoj kaj filmoj.

Prezidanto *Mark Fettes* informis pri laboro de la komitato. plej gravaj decidoj de la komitato estis:

- TEJO iĝas memstara jura personeco
- nova membro de UEA estis Indonezio
- akcepto de la kongresa rezolucio
- nova laborgrupo pri informado

La prezidanto rememoris pri malagrabra evento, okazinta dum la kongreso. La

futbalteamo de UEA ludis matĉon, kaj dum tiu tempo iu ŝtelis la valoraĵojn (monon, poŝtelefonojn ktp) de la ludantoj el la vestoŝanĝejo. UEA kaj gvidantoj de urbo Lillo klopodis kompensi la damaĝojn. Tamen ĉi tiu evento ombris la kongreson.

Fine prezentis sin la loko de la sekva UK. La kongresurbo de la 101. UK estas la Slovacia urbo *Nitra* (hungara nomo: Nyitra). Aperis en la ferma solenaĵo la slovakia ambasadoro, akreditita en Belgion, kaj urbestro de *Nitra*. Ili invitis la kongresanojn, parolante Esperante. Ni ekkonis ankaŭ la prezidanton de LKK, li estas *Peter Balaž*, kiu tuj kaŭzis agrablan surprizon. Li prezentis sian plej gravan helpanton, kiun vokis sur la scenejon. Sur la scenejo li svatis la aperintan fraŭlinon, transdonante al ŝi gefianĉiĝan ringon. Antaŭ ni la fraŭlino diris: jes.

Trarigardante la kongreson per hungaraj okuloj ni havas kaŭzon ĝoji.

- kiel la nova ĝenerala direktoro de la Centra Oficejo de UEA el ses kandidatoj estis elektita *Veronika Poór* kiu okupos sian postenon komence de jaro 2016
- la estraro de UEA aljuĝis la Premion *Deguchi* por *Farkasné Tatár Éva* pro tiu agado kiu pere de Esperanto antaŭenigas la internacian amikecon
- UMEA elektis sia honora membro samideaninon *Faragó Katalin*
- UEA donis „Diplomon pri Elstara Agado” por 12 personoj. Inter ili estas *Koutny Ilona* (pro la gvidado de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato A. Mickiewicz en Poznano) kaj *Szilvási László* (pro informa kaj ĵurnalisma Esperanto-agado)
- UMEA donis premion por Hungaria Esperanto Asocio
- dum la kongreso ni havis eblecon aŭdi grandsukcesajn koncertojn, inter ili tiujn de „teAmo FLOrante”, Anjo Amika, *Slezák Bálint* kaj *Slezák Csaba*,
- la venkintoj de la Internacia Arta Vespero estis *Slezák Bálint* kaj *Slezák Csaba*. La trian lokon en ĉi tiu konkuro akiris „teAmo FLOrante”
- okaze de la Movada Foiro sukcese prezentis siajn librojn *Dr. Márkus Gábor* „Aŭtora Duonhoro”, *Dr. Nanovfszky György* „Nano”, *Kováts Katalin* „Novaj lernomaterialoj” kaj *Ertl István* „De Postdomo al Beletra Almanako”
- UEA donis diplomon por tiuj personoj, kiuj ekde 40 kaj 50 jaroj estas membroj de la Asocio. Inter ili ni aŭdis la nomojn de *Gulyás István* prezidanto de HFEA kaj *Molnár Lajos* prezidanto de Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo.

Ni gratulas al la menciitaj personoj kaj teamoj.

Post la solena malfemo ni komencis nian rondvojaĝon en Francio, pri kio mi raportos en la sekva numero de HFM.

**D-ro József Halász**

## LA 47-a LANDA AMIKA FERVOJISTA ESPERANTO-RENKONTIĜO

Jam denove forflugis unu jaro, kaj denove renkontiĝis la hungaraj fervojistaj esperantistoj tradicie en la urbo Tata. Inter la 3-a kaj 5-a de julio 2015 okazis la 47-a Renkontiĝo, kiun partoprenis nur 42 hungaraj kaj unu aŭstra fervojistaj esperantistoj pro tro varmega vetero. La loko de la okazaĵo estis la „Öreg-tó Klub Hotel”, kie kun eminenta priservado kaj en pretendemaj cirkonstancoj loksidiĝis la partoprenantoj. La renkontiĝon profesie kaj zorgeme organizis la membroasocio de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio en Tata.



*La entuziasmaj organizantoj*

Ĉeestantoj vizitis la Bazilikon kaj ties subpreĝejon, trezorejon kaj kupolon, kaj kompreneble la imponan grandegan navon. Post la abunda tagmanĝo per speciala aŭtobuso tra la ponto „Mária Valéria” vojaĝis la partoprenantoj al la slovakaj urbo Ŝturovo (hungare Párkány), kie okazis promenado en la urbocentro. Post la „eksterlanda” ekskurso denove okazis urborigardo en Esztergom helpe de ĉiĉerono, kiam la partoprenantoj vizitis la famkonatajn konstruaĵojn, interesajn stratojn kaj placojn. Vespere okazis festa vespermanĝo kaj poste drinketo, dume babilado pri la vidindaĵoj en Esztergom kaj Tata, pri la hungara eĉ internacia fervojista Esperanto-movado.

Dimanĉe antaŭtagmeze okazis la tradicia „laborkunsido”, pli precize interparolado pri movadaj aferoj. Bedaŭrinde nur kelkaj fervojistaj esperantistoj partoprenis tiun gravan programeron, sed helpe de Martin Stuppnig konata aŭstra fervojista esperantisto, la babilado estis

riĉenhava kaj interesa. La ceteraj partoprenantoj vizitis la renovigitan „Anglan Parkon”, kaj promenadis sur la bordo de la „Öreg-tó” (Malnova-lago). Post la komuna tagmanĝo okazis hejmenveturado, kiu ankaŭ estis zorge organizita per la helpo de la organizantoj. En la nomo de la partoprenantoj kaj de nia Asocio mi dankas al sinjorino Elizabeta Ködmön, kaj al nia sekretario d-ro József Bacsárdi kaj aliaj membroj de la membroasocio Tata pro la bonega, entuziasma kaj profesia organiza laboro.

**István Gulyás**

Ni jam multfoje skribis pri la urbo Tata, kaj ties beleco, multkoloraj kaj spektaklaj arkitekturaĵoj, kulturaj vivoj. La fervojistaj esperantistoj bone konas tiun urbon, tamen dum la unua tago de la Renkontiĝo la ĉeestantoj vizitis la plej konatan konstruaĵon, la fortikaĵon de Tata. Dum la promenado en la fortikaĵo, helpe de profesia ĉiĉerono, la partoprenantoj ekkonis la historion de la fortikaĵo, kaj povis viziti preskaŭ ĉiun lokon en la konstruaĵo.

Sabate la 4-an de julio okazis vizito en la fama urbo Esztergom, kie dum tri horoj la



*Martin Stuppnig parolas en la laborkunsido*

## Laboras la renoviga vagonaro de fervoja subkonstruaĵo sur la ĉeflinio inter Budapeŝto kaj Miskolc.

La plej forte uzata etapo de la ĉeflinio inter Budapeŝto kaj Miŝkolco. troviĝas inter stacioj *Nagyút* kaj *Mezőkeresztes-Mezőnyárád*. Sur ĉi tiu etapo trafikas la trajnoj inter karbonminejo kaj varmoenergia centralo. Pro la granda vartransporta ŝarĝo la stato de la trako sur ĉi tiu liniosekcio malboniĝis, aperis devioj de trakogeometrio, kaj trakdifektoj. Alia problemo estis la malfavora stato de la grundo sub la trakoj. Karakterize ĉi-loke troviĝas argil-grundo, kies akvo-permeableco estas tre malgranda - praktike nulo -, kaj depende de enhavo je akvo de grundo ĝiaj grundofizikaj proprecoj ŝanĝiĝas. Ekzemple ĉe alta enhavo je akvo, malpliĝas la tonda firmeco de la grundo. Sur pli kaj pli granda longo de la liniosekcio oni devis preskribi rapideclimigon.



*Grupo de la Trafiksciencia Societo el Miskolc*

Sekve de la modernigo komencita en julio, la rapideclimigo estos ĉesigita, restariĝos la laŭhorara veturado, pliboniĝos kvalito de la servo. Kadre de la modernigo renoviĝos entute preskaŭ 42 kilometroj da eksterstaciaj

sekcioj. Per helpo de renoviga vagonaro de fervoja subkonstruaĵo oni fortigas la fervojan subkonstruaĵon, kaj per trakrenoviga vagonaro oni ŝanĝas la relvojan surkonstruaĵon. Apartenas al la renovigaj laboroj la riparo de la kontraŭakva izolaĵo kaj akvodefluigo ĉe la pontoj. Oni ŝanĝas la malbonstatajn kontaktlineajn mastojn kaj renovigas la pavimojn de la traknivelaĵoj pasejoj.

En la haltejoj, apud la dekstra trako la kajoj estos rekonstruitaj, kaj por pliigi la sekurecon okazos ankaŭ la ŝanĝo de kabloj de la sekurigaj instalaĵoj.

Post la fino de la modernigaj laboroj inter *Nagyút* kaj *Mezőkeresztes-Mezőnyárád* sur la dekstra trako la trajnoj povos trafiki per rapido 120 km/h.

La plejaĝula grupo de Trafiksciencia Societo ricevis eblecon viziti la konstruejon, kaj konatiĝi kun la modernaj maŝinoj laborantaj en la modernigo de la fervoja ĉeflinio. La gidmaŝino de



*Vagongrupo transportanta la superfluan grundon*

renoviga vagonaro de fervoja subkonstruaĵo – kies marko-nomo estas PM 1000 URM - ŝajnas unu veturilo, kies longo estas 270 m. Kompletigite per vagonoj transportantaj tiujn minĉarojn kiuj enhavas materialon por la balasto kaj por firmigo de la fervoja subkonstruaĵo, la longo de la tuta renoviga vagonaro estas 1,2 km.

Antaŭ la gvidmaŝino troviĝas tiu speciala vagongrupo, kiu havas sistemon de ruliĝanta transportbendo. Ĉi tiu sistemo transportas la superfluan kvanton de la grundo el tiu vagono, kiu estas plej proksime al la gvidmaŝino al direkto de la plej malproksima, kaj plenigas unu post la alia la unuopajn vagonojn. Kiam la tuta vagongrupo estas plenigita, oni trenas ĝin per lokomotivo al loko de la malplenigo.

Dum laboro la renoviga vagonaro kapablas trafiki per rapido 20 km/h. Trenate de lokomotivo ĝi povas veturi per rapido 100 km/h. La tuta maso de la vagonaro estas 1000 tunoj. Al la vagonaro apartenas vagonoj, servantaj kiel metiejo kun fajlostablo kaj



*La unua kaj dua skrapĉeno*

deponejo por vicpecoj. La funkciiga personalo de la gvidmaŝino en la konstruejo mem kapablas ripari la maŝinon inkluzive de la ŝanĝon de vicpecoj. La gvidmaŝinon provizas per energio usonaj motoroj. El la flavkoloraj turbodizeloj, tipaj „Cartepillar” entute ok troviĝas sur la ferdeko de la gvidmaŝino. El ili kvin havas pli grandan, tri iom malpli grandan povumon. La povumo de la ok motoroj entute estas 4070 kW.

Por funkciigado de la gvidmaŝino oni staplas en 17 oleujoj 23 mil litrojn da dizeloleo. Parto de la gvidmaŝino estas 10 mil litra cisterno, kaj krom tio en la tubosistemo – kies diametro similas al tiu de fajrobrigadistaj duktoj - rondiras pli ol 40 mil litroj da akvo. Preskaŭ ĉiu instalaĵo estas funkciigata per grandprema oleo, per hidraŭliko. La longo de la hidraŭlikaj hosoj estas 10 km-oj. Apud ili preskaŭ naniĝas la longo de la ruliĝantaj transportbendoj, kio estas „nur” 2 km-oj.

Dum 12 hora skipo la maŝino plibonigas la fervojan subkonstruaĵon en 500 m-oj da longo. Po 20 personoj funkciigas la maŝinon dum unu skipo. Ili estas en la taga skipo aŭstroj, en la nokta skipo germanoj.

La maŝinon produktis la firmao *Plasser&Theurer* el Svislando. Ĝia preciza prezo ne estas konata. Entute du tiuspecaj gvidmaŝinoj ekzistas en la tuta mondo. Oni povas aĉeti ĝin kontraŭ 30 – 40 milionoj da eŭro. Kiam ĝi ne laboras ĉe iu fervojo de Eŭropo, ĝi troviĝas en sia establaĵo en Aŭstrio.

Mem la longa gvidmaŝino vere estas vico de diversfunkciaj maŝinoj. La unua renkontiĝinter la maŝino kaj la trako estas ĉe la unua skrapĉeno. La maŝino havas tri skrapĉenojn. El ili la unua kaj la dua estas proksime unu al la alia, kaj ili malkonstruas la balaston. Per telerecaj preniloj la maŝino prenas la relkapojn, kaj levas la trakon. La unua skrapĉeno malkonstruas la supran pli puran parton de la balasto. El tiu balastmaterialo per helpo de magneto oni forigas la metalojn, per kribrilo disigas poste



*La tria skrapĉeno*

diserigas la tro grandajn grajnoj. La unuan skrapĉenon tuj sekvas la dua, kiu forigas la malsupran kun grundo iomete miksiĝintan parton de la balasto. Ĉi tiu materialo per helpo de ruliĝanta transportbendo iras al tiu kribrilo, kiu disigas la uzeblan balastmaterialon de la kribradrestaĵo. La mekanikaĵo de la maŝino helpe de sistemo de ruliĝantaj transportbendoj kunmetas la materialon devenantan el la unua skrapĉeno kun la uzebla balastmaterialo de la dua skrapĉeno. Pro la longtempa uzo, kaj la trakĝustigado la grajnoj de la balasto rondiĝas, perdas siajn randojn. La rondiĝintaj grajnoj ne estas konvenaj por balasto. Do, maŝinuno iomete rompas la grajnoj, ke ili havu randojn. La tiel pretigita balastmaterialo iras en la lavparton, kie oni lavas ĝin per akvo, por forigi la polvon de la grajnoj. La lavitan balastmaterialon ruliĝanta transportbendo portas al la malantaŭa parto de la maŝino, kie oni denove uzas ĝin por malsupra tavolo de la nova balasto. Ankaŭ la kribradrestaĵo estas uzata, kiel fortiga tavolo, tiel maniere ĉe la kutimaj konstrumetodoj la bezonata kvanto de nova materialo por subtavolo estas malpliigebla.



*Lavumo de la gvidmaŝino*

Estas videble, per ĉi tiu maŝino oni povas modernigi la fervojlinion tre ekonomie, ĉar plej granda parto de la balastmaterialo, troviĝanta surloke denove estas uzebla. La plej granda amasvaro, kio estas bezonata por fervojkonstruado estas la balastmaterialo. Tiel eblas ŝpari gravan parton de kotizoj de la balastmaterialo kune kun ĝia transporto. Tre nova, ĝis nun ne uzata agado estas lavado de la balastmaterialo. La lavunuo estas



*Kribriloj*

fermita sistemo, kiu en sedimentigujon kolektas la poluaĵon kaj ŝlimon laŭ preskriboj de la medioprotektado.

La tria skrapĉeno troviĝas iom pli malproksime de la dua, kaj ĝia tasko estas laŭbezone pli-malpli grandan tavoldikon da grundo forigi de sub la trako. Ĝenerale ĉi tiun forigitan kvanton de la grundo transportas ruliĝantaj transportbendoj en tiun menciitan specialan vagongrupon, kiu troviĝas antaŭ la gvidmaŝino.

Malantaŭ la tria skrapĉeno la distanco inter la grundnivelo kaj la relparo estanta en la aero estas 60 – 70 cm-oj. La trian skrapĉenon sekvas aparato, kiu ebenigas la surfacon de la grundo, kaj vibratoro, kiu kompaktas ĝin.

La gvidmaŝino estas taŭga konstrui multtavolan fervojan subkonstruaĵon. Ĉi-loke la maŝino kovras sur la grundan surfacon geotekstilaĵon, kiu en difinitaj distancoj portas aluministriojn. Ilia tasko estas, ke en la estonto per helpo de taŭgaj aparatoj oni kapablu ekkoni la lokon, pli precize la nivelon de la geotekstilaĵo. La geotekstilaĵo estas filtrilo, kiu apartigas tavolojn, ebligas iri la akvon tra si, sed obstaklas la trairon de la ŝlimo, tiel

ĝi malhelpas la kotiĝon de tavolo troviĝanta super si. Sur la geotekstilaĵon venas la fortiga tavolo, konsistanta grandparte el kribradrestaĵo. La materialon de tiu tavolo portas al loko de la konstruado mem la gvidmaŝino per sia ruliĝanta transportbendo. Konvena aparato ebenigas la tavolon, kiun vibratoro kompaktas. Sur la kompaktitan surfacon



*Minĉaroj transportantaj la specialan pistaĵon*

venas geokrado, kiun simile al la geotekstilaĵo oni portas al la konstruejo en formo de rulaĵo. La gvidmaŝino havas taŭgan mekanismon akcepti, kaj sterna rulaĵon, sur la kompaktitan surfacon. La geokrado estas produktita el sufiĉe forta plasto, kaj pliigas la tondan firmecon de la subkonstruaĵo.

La sekva tavolo estas pretigita el speciala pistaĵo, kies materialo estas kalkoŝtono, aŭ dolomito. Plenumi la preskribitan kompaktecon, la dimensioj de la grajnoj devas esti inter difinitaj limoj, kaj simile

ankaŭ la enhavo je akvo de la materialo. Ĉi lastan laboristoj de la konstruentreprenisto sisteme kontrolas en loko de la stokejo, antaŭ enminĉarigo de la materialo. Se estas necese ili akvumas kaj miksas la materialon. El la stokejo al la konstruejo la specialan pistaĵon oni transportas per speciala vagonaro. Ĉi tiu speciala vagonaro konsistas el platvagonoj. Ambaŭflanke laŭlonge de la vagonaro iras reloj, sur kiuj trafikas du ruligeblaj gantrogruoj. Po kvar specialaj minĉaroj estas sur la vagonoj en kiujn oni kargas la specialan pistaĵon - aŭ se estas bezonate kompletigi la balastmaterialon ankaŭ ŝotron - per bagro. La kargitan vagonaron per puŝhelpa veturo oni aligas al malantaŭa parto de la gvidmaŝino. La gvidmaŝinon per materialo servas la du grupoj. La grupoj prenas, levas minĉaron, kaj portas ĝin al la gvidmaŝino, respektive la malplenan minĉaron de la gvidmaŝino al fino de la vagonaro. Rapidigi ĉi tiun transporton inter la grupoj estas labordivido. La malantaŭa grupo portas la plenajn minĉarojn ĝis mezo de la vagonaro, kie la alia grupo transprenas ilin. La antaŭa grupo portas la malplenajn minĉarojn ĝis mezo de la vagonaro, de kie la alia transportas ilin plu. La gvidmaŝino prenas la plenan minĉaron, malplenigas ĝin sur sian ruliĝantan transportbedon kiu portas la materialon al loko de la konstruado. Tie konvena aparato ebenigas, vibratoro kompaktigas ĝin.

Simile oni formas la sekvan tavolon, la malsupran parton de la balasto el lavita ŝotro, kiu subtenas la trakon. Poste oni kompletigas la balaston. La gvidmaŝino havas trakĝustigan unuon, kiu certigas la ĝustan trakogeometrion, kaj samtempe funkcias kiel balastoŝtopmaŝino. Direkti la laboron de ĉi tiu maŝinunuo, oni muntis konzolojn sur la relon de la najbara trako. Inter la konzoloj estas streĉita konduktilo, kiu montras la geodezian situacion de la modernigata trako. La gvidmaŝino per helpo de kontaktbrako transprenas la bezonatajn informojn de la streĉita konduktilo por la trakĝustigado. Malantaŭ la renoviga vagonaro de fervoja subkonstruaĵo sur la trako tuj oni povas veturi per rapido 40 km/h

.Ni tre dankas al firmao *Swietelsky* la eblecon ekkoni la funkciadon de ĉi tiu unika renoviga vagonaro.

**D-ro József Halász**

# NEKROLOGO

## D-ro FERENC PHERSY

(31 08 1920 – 08 07 2015)



La 8-an de julio 2015 mortis **D-ro Ferenc Phersy** en sia 95-a jaraĝo. Li naskiĝis la 31-an de aŭgusto en la jaro 1920 en urbo Miskolc. Li komencis sian fervojistan deĵoron en la jaro 1944 en la fervojstacio de Miskolc, kiel trajnekspedisto. En 1945 li edziĝis, kaj en 1946 naskiĝis lia filo. Bedaŭrinde lia edzino post longa rigora malsano mortis en 1947.

Poste li ricevis taskon en la Fervoja Direkcio Miskolc en la personal- kaj laborafera fako. En la jaro 1949 li denove edziĝis, el tiu geedziĝo naskiĝis du filinoj (1953; 1955). En la jaro 1953 la fervojo dungis lin en la Fervoja Ĉeffako de la Ministerio de Trafika- kaj Poŝta Aferoj en la ĉefurbo de Hungario. Ankoraŭ en tiu jaro li translokigis ankaŭ sian familion al Budapeŝto. Ĉi tie pli facile povis daŭrigi la studadon en la Eötvös Lóránd Scienc-universitato en la Jura Fakultato. Intertempe li laboris, ĉar devis prizorgi sian familion. En la jaro 1958 li diplomiĝis kaj doktoriĝis pri jura-scienca.

Baldaŭ li estiĝis estro de la Jura Faksekcio de Fervoja Ĉeffako (nun Generaldirekcio de MÁV). Ĉi tie li interkonatiĝis kun D-ro István Bácskai, kiu kapacitis lin por Esperanto. Li komencis la lernadon de lingvo Esperanto, kio trahelpis lin pri la streĉiĝo post la universitata studado. La instruisto de la lingvokurso estis Simon Csóra, kaj poste li faris ekzamenon de Julio Baghy. Li laboris kiel jura konsilisto kaj meritis plurajn honorigojn ekz. Merita Fervojisto, Eminentia Fervojisto, Eminentia Laboristo k.t.p. En Esperanto movado li atingis sukcesojn, li estiĝis prezidanto de la Centra Fervojista Fakgrupo kaj komitatano de IFEF. Li partoprenis en multaj kongresoj de IFEF, kaj post D-ro Bácskai li ricevis la taskon UEA Komitatano-A por IFEF.

Bedaŭrinde tragika malsano devigis lin fini kaj la fervojistan juran ĉefkonsilistan deĵoron kaj la laboron en Esperanto movado. En decembro de 1979 pro kormalsano oni flegis lin en hospitalo dum sufiĉe longa tempo. Tie li ricevis „pacemaker”-on. Post unu jaro – en sia 60-a jaraĝo – li emeritiĝis. La gefiloj geedziĝis, naskiĝis genepoj, kaj li ĝojis pri la pligrandiĝanta familio.

La jaroj kuris, kaj la inspiro de sia filo li partoprenis en la 56-a IFEF-Kongreson en la urbo Sopron en 2004. Tiu estis la lasta Esperanto aranĝaĵo kiun li partoprenis.

En la jaro 2006 li ricevis cerbo-katastrofon (stroke-on) kaj pro tio li perdis la parolkapablon. Komence de junio en ĉi tiu jaro oni veturigis lin en hospitalon pro nova cerbo-katastrofo, de kie li jam ne elvenis. Antaŭ preskaŭ 2 monatoj de sia 95-a naskiĝtago li eterne foriris. Lia familio, parencoj, konatuloj kaj la esperantistoj funebris, kaj konservis lian memoron.

Ripozu en paco!

**Hungara Fervojista Esperanto-Asocio**



**Ekskursantoj dum la 47-a Landa Amika Fervoja E-Renkontiĝo**



**La 68-a kongreso de IFEF okazos de la 21-a ĝis la 28-a de majo 2016 en Bulgario en la urbo Varna.**

**Informojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi de HFEA.**